RADIO HABANA CUBA
Artículo Editado por Maritza Gutiérrez González
20/06/2019 09:15:27

Projekto de nova elekta leĝo en Kubo



Havano, 20 jun (RHK) Estis prezentita en nacia videokonferenco la projekto de la Elekta Leĝo debatota kun la deputitoj, kio okazis per la sama partoprena esenco de la diversaj leĝaj procezoj antaŭaj, kaj plenumante mandaton konstitucian, kiu starigis en siaj transiraj dispozicioj, limdaton ĝis ses monatoj ĝin.

Dum la prezento de la projekto, Esteban Lazo Hernández, prezidanto de la nacia parlamento, insistis pri la bezono konscie kaj detale trastudi la tekston por esti kapablaj fari aldonojn esencajn al leĝa normo, kiu devas esti spegulo de la travideblo kaj demokratieco de la kuba revolucio.

En la sidejo de la Kapitolo oni informis al ĉiuj provincoj kaj teritorioj, ke nun ekas procezo por kolekti opiniojn, sugestojn, modifojn kaj dubojn de la deputitoj, kio malfermiĝas ankaŭ al la civitanaro,por poste starigi interkonsenton kaj submeti ĝin al analizo en la venonta sesio de la parlamento venontjulie, kie devas esti aprobita la nova leĝo por plenumi la laborprogramon starigitan post aprobo de la nova konstitucio.